

KORPO KAJ SANGO DE KRISTO – 22an de junio 2014

MIA KORPO ESTAS VERA NUTRAĴO KAJ MIA SANGO VERA TRINKAĴO – Komento al Evangelio de p. Alberto Maggi OSM

El evangelio laŭ Johano 6,51-58

En tiu tempo diris Jesuo al la popolamaso:

“Mi estas la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo. Se iu manĝos el ĉi tiu pano, li vivos eterne. La pano, kiun Mi donos, estas mia karno por la vivo de la mondo”.

Tiam la Judoj disputis inter si, dirante: “Kiel Li povas doni al ni sian korpon por manĝi?”. Jesuo diris al ili: “Vere, vere Mi deklaras al vi: se vi ne manĝas la korpon de la Filo de la homo kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi la vivon. Kiu manĝas mian korpon kaj trinkas mian sangon, havas eternan vivon, kaj Mi revivigos lin en la lasta tago. Ĉar mia korpo estas vera manĝaĵo, kaj mia sango estas vera trinkaĵo.

Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, restas en Mi, kaj Mi en li. Kiel sendis Min la vivanta Patro kaj Mi vivas dank' al Li, tiel, kiu manĝas Min, vivos dank' al Mi. Ĉi tiu estas la pano, kiu venis de la ĉielo. Ĝi ne estas kiel tiu, kiun viaj patroj manĝis, kaj tamen mortis. Kiu manĝas ĉi tiun panon, vivos eterne”.

La vortoj, kiujn nun ni legos kaj komentos, tiuj de Jesuo en la evangelio de Johano, estas tiom gravaj ke, je ilia fino, granda parto el liaj

discípuloj lin forlasos kaj neniam plu revenos al li. Ni vidu do kio grava enestas en tio kion Jesuo diris.

En la ĉapitro 6 de la evangelio de Johano ni trovas longan kaj intensan instruadon pri la Eŭkaristio. Johano estas la ununura evangeliisto kiu ne raportas la rakonton de la vespermanĝo, sed li estas tiu, kiu, pli ol la aliaj, pensas pri ĝia profunda signifo.

Ĉapitro 6, do, estas instruado, katekizado al la kristana komunumo, pri la Eŭkaristio. Ni legu la ĉapitron 6, ekde la versiklo 51. *"Mi estas"*, kaj Jesuo depostulas la dian kondiĉon, *"la viva pano, kiu malsupreniris de la ĉielo. Se iu manĝos el ĉi tiu pano, li vivos eterne"*.

Jesuo certigas ke la aliĝo al li estas tio kio permesas al la homo havi vivon tiom altkvalitan, ke ĝi estos nedetruebla. Tio estas la eterna vivo. Jesuo, la filo de Dio, iĝas pano, por ke tiuj kiuj lin akceptas kaj kapablas iĝi pano por la aliaj, iĝu ankaŭ ili filoj de Dio. *"La pano, kiun Mi donos, estas mia karno"* – Jesuo utiligas ĝuste la vorton karno, kiu indikas la homon en lia malforteco, *"por la vivo de la mondo"*.

Tio kion Jesuo estas diranta, tre gravas: la vivon de Dio oni ne donas ekster la homa realo. Ne povas esti komunikado de la Spirito tie kie ne estas ankaŭ la donaco de la karno. La donaco de Dio do iras tra la karno, diras Jesuo. La surtera, malforta flanko de lia vivo. Ĉi tie la evangeliisto prezentas kontraŭstarigon inter la religiaj homoj kiuj leviĝas por renkonti Dion – iun Dion kiun la religio igis malproksima, neatingebla, nealirebla – kaj, male, iu Dio kiu malsupreniras por renkonti la homon.

"Tiam la Judoj", per tiu vorto en la evangelio de Johano oni celas la aŭtoritatulojn, *"disputis inter si, dirante: "Kiel Li povas doni al ni sian korpon por manĝi?"*. Iu Dio, kiu, anstataŭ pretendi donacojn de la homoj, sin donacas al la homo ĝis kunfandiĝi kun li, igas sin nutraĵo por li. Tio estas neakceptebla por la religiaj aŭtoritatuloj kiuj bazas sian tutan povon sur la disigo inter Dio kaj la homoj.

Iu Dio kiu volas esti akceptata de la homo kaj kunfandiĝi kun ili, tio por ili estas ne nur netolerebla, sed estas danĝera. Nu Jesuo respondas al ili: *"Vere, vere Mi deklaras al vi"*, do la duobla aserto *"vere, vere Mi deklaras al vi"* estas tiu kiu antaŭas la solenajn, gravajn deklarojn de Jesuo, *"se vi ne*

manĝas la korpon de la Filo de la homo kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi la vivon”.

Jesuo referencas al la bildo de la ŝafido, la paska ŝafido. Dum la nokto de la Eliro Moseo ordonis al la hebreoj manĝi la ŝafid-viandon ĉar tio estus dononta al ili la forton por eki tiun vojaĝon al libereco kaj aspergi la sangon sur la pordofostojn, ĉar tio estus ilin disigantaj disde la agado de la mortanĝelo.

Nu Jesuo prezentiĝas kiel karno, nutraĵo kiu donas la kapablon entrepreni la vojaĝon al plena libereco, kaj kies sango ne liberigas de la surtera morto, sed liberigas de la difinitiva morto. Poste Jesuo, se eventuale ne estus estinta komprenebla lia aserto, diras: *“Kiu maĉas mian karnon”*. La verbo maĉi en la greka estas tre kruda, primitiva, en la greka ĝi estas *“trogon”*. Jam la sono donas la ideon de io primitiva, kaj ĝi signifas *“maĉi, dispecigi”*.

Jesuo do volas eviti ke la aliĝo al li estu ideala aliĝo, sed ĝi devas esti konkreta. Fakte li diras: *“Kiu manĝos mian karnon kaj trinkos mian sangon, tiu havos la eternan vivon”*. La eterna vivo por Jesuo ne estas estonta premio por la bona konduto estanta, sed iu ebleco de vivkvalito en la estanteco. Jesuo ne diras *“tiu havos la eternan vivon”*. La eterna vivo jam estas. Kiu, kiel li, faras el propra vivo amodonaco por la aliaj, tiu havas vivon de tioma kvalito kiu estas nedetrujebla.

“Kaj mi lin releviĝos la lastan tagon”. La lasta tago ne estas la fino de la tempoj. La lasta tago, en la evangelio de Johano, estas la tago de la morto en kiu Jesuo, mortante, komunikas sian Spiriton, tio estas vivelementon kiu allasas, al tiu kiu ĝin akceptas, nedetrujeblan vivon.

Kaj Jesuo konfirmas ke lia *“karno estas vera nutraĵo kaj lia sango estas vera trinkaĵo”*. Kun Jesuo ne estas eksteraj reguloj, kiujn la homo devas respekti, sed asimilado de nova vivo. Kaj lia karno estas vera nutraĵo, tiu kiu nutras la vivon de la homo, kaj lia sango vera trinkaĵo, tio estas elementoj kiuj eniras en la homon kaj fandiĝas kun li. Ne plu iu ekstera kodo observenda, sed vivo asimilenda.

Jesuo prezentas al ni iun Dion kiu ne ensorbas la homojn, sed ilin plifortigas. Iu Dio kiu ne prenas la energion de la homoj, sed komunikas al ili la sian. Kaj Jesuo daŭrigas insisti: *“Kiu maĉas mian karnon kaj trinkas mian*

sangon, tiu restas en mi kaj mi en li". Jen la plena fandiĝo de Jesuo kun la homoj kaj de la homoj kun Jesuo.

Tiu de Jesuo estas iu Dio kiu petas esti akceptata por fandiĝi kun la homoj kaj pligrandigi la amkapablon. "*Samkiel la Patro, kiu havas la vivon*", kaj tio estas la ununura fojo en kiu Dio estas difinita kiel la Patro kiu estas vivanta, "*sendis min*", la Patro sendis la filon por manifesti sian senliman amon, "*kaj mi vivas per la Patro, tiel ankaŭ tiu kiu maĉas...*" refoje Jesuo insistas per tiu ĉi verbo kiu indikas ne aliĝo teoria, sed reala kaj konkreta, "*...min, tiu vivos per mi*".

Al la vivo ricevita de Dio korespondas vivo komunikata al la gefratoj. Tiu estas la signifo de la Eŭkaristio. Kaj, samkiel la Patro sendis la filon esti videbla manifestiĝo de senlima amo, tiel tiuj kiuj akceptas Jesuon estas alvokataj manifesti senkondiĉan amon.

Kaj konkludas Jesuo: "*Ĉi tiu estas la pano, kiu venis de la ĉielo. Ĝi ne estas kiel tiu, kiun viaj patroj manĝis, kaj tamen mortis*". Jesuo metas la fingron en la vundon de la fiasko de la Eliro. Ĉiuj tiuj kiuj eliris de Egiptio estas mortintaj. Iliaj filoj estas enirintaj. Kaj Jesuo kontraŭmetas sian Eliron kiu estas male destinita al plena realigo.

Kaj refoje Jesuo insistas: "*Kiu maĉas*", do aliĝo plena kaj totala, ne simbola, "*tiun ĉi panon vivos porĉiame*". Kiu orientas propran vivon, kun Jesuo kaj kiel Jesuo, favora al la aliaj, tiu jam havas vivon kiun la morto ne povos interrompi.